



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1993 — 3


(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Baghy, kaj la arlekeno de la vivo, kaj ...



... evoluo de la ĝardenarto en Parizo

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangoul)	2
Tra parizaj ĝardenoj (S. Boniol)	3-4
Baghy: la arlekeno de la Vivo (F. Boyet)	5-7
Pri reĝo Arturo (II) (S. Boniol)	8-9
Pri fama pionira movado (Golden)	10-11
La mumio de la reĝo Tabinit: fino	12-13
Por via distro	14
La parko de Gresillon	15-16

El Gresillon

"Meza" jaro. Kontentiga nombro da ĉeestantoj, meza aĝo pli malalta ol kutime, eksterlanda partopreno kreskinta. Sed restado-daŭroj malpli longaj. Dum la oktobra kunveno la komitato studos la ciferojn.

La respondeculoj renkontis kelkajn malfacilaĵojn: unu kuiristo maldungita, alia senaverte malaperinta! Sed ne gravis, ĉar la etoso estis, kiel kutime, tre agrabla.

Tamen problemoj restas nesolvitaj: tiu de la staĝ-deĵorantoj; administrado kaj servistaro-respondeco. Ĉiujare estas nefacile "trovi" volontulojn; ĉiam la samaj estas kontaktitaj kaj ili ŝatus de tempo al tempo ĝui veran libertempon, almenaŭ unu jaron el du. Sed la nombro da ĝeamikoj pretaj "sin ĵeti en la banon" estas ne sufiĉa. La ideala solvo estus,

ke paro de "junaj emeritoj" konsentus loĝi en Gresillon dum tri monatoj: junio, julio kaj aŭgusto. Tio ebligus pli koheran disvolviĝon de la somera Greziona vivo. La servistaro estas ĝenata de tro ofta ŝanĝo de la staĝ-respondeculoj. Komprenoble financa kompenso estus pridiskutata. Sed ĉu ekzistas tiu paro? La volontuloj por trimonata aŭ nur dusemajna deĵoro estos informitaj pri la funkciado de la Domo. Tiu funkciado estas plurfaceta sed ne vere malfacile kaptebla. La rilatoj kun la servistaro estas ĝenerale simplaj; post ricevo de precizaj instrukcioj ili bezonas fidon, kontrolon sed ne ĝenon. Ni esperas, ke la kandidatoj estos, verŝajne ne multaj, sed tamen pluraj. Bone pripensu. Gresillon bezonas vian helpon.

ANNA ENMONDIĜIS

gratulojn al la gepatroj

Saša Sirovec kaj François Lo Jacomo

Esperanto tra la Mondo



LA 78-a UNIVERSALA KONGRESO-

Pli ol 1 800 geesperantistoj el 65 landoj partoprenis la U.K. en Valencio de la 24-a ĝis la 31-a de julio. La kongresa ĉeftemo estis: "Klerigo por la 21-a jarcento". La ĉeestantoj povis elekti inter pli ol 100 programeroj. La Papo sendis tre esceptan mesaĝon. Kiel kutime okazis teatraj, muzikaj, folkloraj vesperoj, Internacia kongresa universitato, infana kongreseto, k.t.p. Estis akceptita la realigo de Urugvaja Esperanto-Societo. La 79-a kongreso okazos en Seulo de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1994.

NEFINITA ROMANO DE J. VERNE ELDONITA-

Oni sciis, ke la franca verkisto estis entuziasma amiko de esperanto. Jam en 1903 li akceptis esti la honora prezidanto de la esperanto-grupo en Amiens, kaj li promesis verki romanon en kiu esperanto ludos gravan rolon. Sed li mortis komence de 1905.

En 1987 la urbo Nantes, lia naskiĝurbo, aĉetis la nepublikigitajn manuskriptojn de la verkisto kaj oni komencis eldoni ilin. Inter ili estas la komenco de la nefinita koncernata romano pri esperanto; temas pri "Studvojaĝo" (kvin ĉapitroj estis skribitaj), kiu aperas en libro titolita "San Carlos". Eldonisto: "Editions du Cherche-Midi". Prezo: 120 ff. En la romano, rusa esperantisto instruas la internacian lingvon al la membroj de oficiala franca misio sendita al Afriko: Jules Verne imagis, ke esperanto estas tre disvastigita sur tiu kontinento.

INTERNACIA KONKURSO POR LERNEJANOJ-

Kiel lastjare la Komisiono de ILEI pri Lernejaj Konkursoj lanĉas internacian konkurson inter lernejanoj, de oktobro ĝis majo. Estas du kategorioj: malpli ol 14-jaraj geknaboj, pli ol 14-jaraj ĝis 19-jaraj geknaboj. Ambaŭ kategorioj havas du grupojn: komencantoj kaj progresintoj (pli ol dujara studado). Soluloj rajtas

partopreni kun atesto de la klasestro. Ĉiumonate aperos taskofolioj, entute 7 jare. Ĉiu folieto enhavas 6 ĝis 10 simplajn taskojn. Informas, Stefan MacGill, Esö u. 7, H- 1034 Budapeŝto, Hungario.

EN LA BUDAPEŝTA UNIVERSITATO EÖTVÖS-

Jam de 1966 funkcias esperanto-fako en tiu hungara universitato. Ĝin gvidis, ĝis sia morto en 1987, prof. Szerdahely. Nun priĝorgas la fakon d-rinoj Ilona Koutny kaj Zsuzsa Varga-Haszonits. Nun ankaŭ komenciĝas trijara internacia korespondakurso post kiu oni povos doktoriĝi. Ĉe smestro-finoj oni devas restadi en Budapeŝto unu semajnon por ĉeesti prelegojn, partopreni konsultigojn kaj ekzamenojn. En la kadro de interlingvistiko la studoj ebligas specialiĝon pri diversaj terenoj de esperantologio. Aliĝis studentoj el deko da landoj. La adreso estas: Esperanto-fako, Universitato Eötvös, p.k. 107, H- 1364 Budapeŝto, Hungario.

PASPORTA SERVO-

"Pasporta Servo", listo de esperantistaj gastigantoj 1993 aperis. Ĝi entenas 906 adresojn en 72 landoj. Se vi intencas "dikigi" tiun liston, skribu al: "Pasporta Servo", p/a Rob Keetlaer, Postbus 2310, NL- 1000 CH Amsterdam, Nederlando.

ESPERANTO KAJ KOMERCO-

La 16-17a de oktobro, en Mittelwihr (Alzaco), la Orientfranca Esperanto-Federacio kaj TAKE (Asocio de Konstruistoj esperantistaj) proponos, krom kursoj, serion de prelegoj pri la supra temo. Informas: Edmond Ludwig, 26 route de la Schlucht, F- 68140 Stosswihr.

PERKOMPUTILA TERMINARO-

Rüdiger Eichholz, membro de la esperanta akademio, eldonis en Kanado trivoluman perkomputilan Terminon-kolekton en amplekso de 1 816 paĝoj. En komputillegebla formo, la tri libroj prezentas la produkton de plurjara laboro en la kampo de la fakaj vortoj de esperanto.

Tra la parizaj parkoj

La ĝardenhistorio datiĝas de la mezepoko. Kiaj estis la tiamaj ĝardenoj? Ofte malgrandaj, krom ekster la remparo; kvadratformaj, ofte destinitaj al kultivado de medicinaj plantoj. Kalkuleblis multaj abatejaj ĝardenoj, nun malaperintaj.

Reĝo Karlo la kvina, la "saĝulo", signis vojturniĝon en la ĝardenarto. Fine de la Civito, sur nia "kronprinca placo" etendiĝis la ĝardeno de la reĝo, sur multaj miniaturaj videbla. Tie kreskis fruktoarboj; ĝi estis beligita per laŭboj, kie kreskis floroj, interalie rozoj (ili atingis nian landon tempe de la Merovidoj). Karlo la kvina tradukigis tekston verkitan de Bolonjano. La aŭtoro klanigas, kiel kultivi la kreskaĵojn laŭ la grundo kaj sunoricevo; kiel starigi domon laŭ la rango de la posedanto: malsamis la maniero laŭ tio, ĉu oni estas reĝo, riĉulego aŭ mezriĉulo; kiel havigi al si iom pli foran perspektivon, ol la limojn de fermita ĝardeno por rigardi al la bosko, kie vivas la sovaĝaj bestoj. Sur tiu libro baziĝas la eŭropaj ĝardenoj.

Post la mezepoko venis la itala influo pro la militoj en Italio kaj post la reveno de Francisko la unua. Li venigis Francion italajn arkitektojn enkondukantaj novigaĵojn, t.e. la grotoj por la plezuro de sinbanado. La unua estis aranĝita en Fontainebleau. Poste Katarina de Mediĉoj siavice venigis tutan skipon da italaj amikoj. Ĉi-lastaj anstataŭigis la modon de la ĝistiamaj plataj ĝardenoj per terasoj, ĝardenoj laŭetaĝaj. Komprenable en la urbo mem la reĝino povis krei nur platan ĝardenon, kamparflanke, apud la palaco de la Tegolejoj, ĉar la loko estas samnivela, kiel la rivero Sejno. Sed en la pariza ĉirkaŭaĵo la parkon Saint-Cloud kreis iu

el la itala skipo, Bondi-skipo, laŭ plurnivela plano pro la forta terendeklivo; li ĝin provizis per kaskadoj kaj groto, inspirante sin per la romaj kaj florencaj ĝardenoj. La nuntempe ĝuebla kaskado estis kreita fare de Monsieur, duko de Orléans, frato de Ludoviko la XIV-a. Per tiu mirinda donaco la juna reĝo intencis honorii sian fraton. En tiu bela parko estas multo por makovri: sinsekvo da terasoj, akvoludoj, la kaskado eĉ plibeligata dum la jaroj 1790-a; unuvorte la ĝenerala plano de Le Nôtre, iom post iom efektivigita laŭ sinsekvaj terenaĉetoj.

Laŭlonge de la XVIII-a jarcento daŭradis la aranĝoj kaj arboplantado. Post Monsieur, malmulton faris la regento tie, sed lia nepo, ŝtanta de la laŭmodaj kurbaĵoj, kreis la grandan amfiteatron sur la suda deklivo, kie mirindan vidaĵon al Parizo oni ĝuas.

Tiun parkon la Orléans-familio eksterordinare transformis kaj plibeligis, sed, samkiel en Versajlo, la ĉeflinioj de Le Nôtre desegnitaj estis gardataj. Maria-Antoneta estis titolita posedantino de Saint-Cloud (1785): pro la senmezuraj elspezoj de duko de Chartres, la patro vendis la bienon Saint-Cloud al la reĝino, kiu bone ĝin prizorgis. Ne venis damaĝoj pro la revolucio. En la epoko de Napoleono la unua la bieno fariĝis nacia posedaĵo. Napoleono loĝis en la kastelo kaj ĝin rebonigis: poste Ludoviko la XVIII-a transformis la labirinton de Le Nôtre. Napoleono la tria kompletigis la seninterrompan agadon per aldono de kiosko kaj ĵageto. Al Eugena tre plaĉis Saint-Cloud.

Nun iom pri la parko Saint-James sur avenuo de Madrido en Neuilly. En 1774 tre riĉa industriisto kaj financisto volis krei ĝardenon same belan, kiel Bagatelle en la Bulonjo-arbaro, eĉ pli belan ol ĝi. Tial li komisiis arkitekton Bélanger, la kreinton de Bagatelle kaj donis al li planektan liberecon. Bélanger elpensis parkon tre similan al Bagatelle, kun artefarita rivereto, serpentumaj vojoj, kiuj 16 fojojn

superiris la riveron. En ambaŭ parkoj estis pumpilo, kiu suprenvenigis akvon en rezervujon. En Saint-James estis granda kanalo, kiu liveris akvon al la rezervujo, ĉe la supro de la alta roko de Bélanger konstruita. Plaĉis reamalkovro pri la itala kaj helena artoj. Tial ene de tiu alta roko Bélanger prezentis kopion de helena templo kun kolonoj kaj frontono. Tiuepoke oni aranĝis en ĝardeno groton kaj kaskadon pro la plezuro de l'okulo, pro malvarmeto, banplezuro kaj la emo montriĝi kiel eble plej eksterordinara...

Bélanger estis plurfoje irinta al Anglujo por krokizi tiujn "anglajn" ĝardenojn, kiujn li volis krei en Parizo. La francaj ĝardenoj titolitis anglaj multe inspiriĝis pri Jean-Jacques Rousseau: Ermenonville (kie li estis enterigita), Saint-James kaj Bagatelle (kie staras bustoj de li). Oni konsciis, ke oni sin ree direktas al la naturo, tiom laŭdegata de li. La posedanto de Saint-James, framasono, estis naturamiko. En parkangulo li starigis natursciencan kabineton kun tri flankaj vitro-domoj por la ekzotaj plantoj. La parkoj de la princoj kaj altranguloj foje malfermiĝis al la publiko: la ĝardeno de la Tegolejoj, Versajlo, Saint-Cloud en septembro, okaze de la loka festo.

Post la revolucio la urbaj konsilantaroj kreis senpagajn parkojn (ekzemple Monceau). Laŭ sociala celo Napoleono la tria kaj barono Haussmann volis favori la parizan loĝantaron per promen-ĝardenoj. Tiam ekaperis multaj ĝardenplacoj tra la diversaj urbokvartaloj. Monceau-parko, kreita fine de la XVIII-a jarcento, rehavigita al la urbo tempe de Haussmann, multe ŝanĝiĝis: nur la kerno estis konservita. La riveretoj kaj serpentumaj vojetoj de la malnova malaperis profite al vastaj gazonoj kaj krucoforma vojo kun turniĝanta aleego. En la epoko de Haussmann kaj ties arkitekto Alphand estis laŭmoda la pejzaĝ-prezenta ĝardeno: vastaj

gazonoj, laĝetoj kun insuloj anstataŭ la antaŭaj kanaloj, kio estis pli facile prizorgebla.

Por krei la famajn Buttes-Chaumont, Alphand uzis la malnovajn skisto-minejojn formantajn enan groton; li aldonis tre longan kaskadon ankoraŭ nuntempe ekzistantan. Tial, ke en la kvartalo loĝis multaj laboristoj senigataj je la ebleco vojaĝadi, Alphand elpensis variajn ĝarden-pejzaĝojn, por ke la tieaj promenantoj havu la impreson viziti Eŭropon. Al ilia fantazio li proponis kvazaŭan normandan klifton kun helena templo supre de ĝi, kvazaŭajn Alpojn kun kaskado; pontoj kaj trairanta fervojo plifortigis la impreson.

Depost la itala influo, dum la XVI-a jarcento, la princoj kaj altranguloj konstante konkretigis kaj esprimis siajn revojn pere de la ĝardenoj kaj ties simboloj: statuoj, labirintoj, grotoj, kaskadoj. Ĉu la vorto "paradizo" ne signifas "ĝardenon"? La mito de la perdita paradizo subkuŝas en la ĝardenhistorio. Sed por ĉiu, ĝardeno estas loko, kien oni plezure iras. Komence de la XVII-a jarcento, la barokajn ĝardenojn oni titolis "plezurĝardenoj" kun superabundaj floroj, flore surbroditaj bedoj, misteraj grotoj kun mirindaj akvoludoj. Post tia artefarita plezuro oni revenis fine de la XVIII-a jarcento al plezuro pli laŭnaturo, poste eĉ al burĝara plezuro. Se ĝardenarkitekto havas la taskon ordigi la naturon laŭ la epokogusto, ĉu tamen ne estus dezirinde, ke la historiaj ĝardenoj estu konservataj laŭ sia origina aspekto?

Simonne BONIOL

8a INTERNACIA KULTURA ESPERANTO FESTIVALO

ARTOJ

Inf. C. Nourmont, 2 om Kläppchen, L-5682 Dall

BAGHY - LA ARLEKENO DE LA VIVO

Prelego de F. Boyet - 1-a parto

Mi elektis tiun temon, kiam mi rememoris pri la legado de "Printempo en la aŭtuno", kie estas du "artistoj": la divenisto kaj la arlekeno, kiuj kune pripensas pri la signifo de la vivo. Sed mi elektis la titolon, post legado de alia verko pli intima: "La teatra korbo". En tiu rakonto, Baghy parolas pri sia infanaĝo en korbo de teatro (liaj gepatroj estis migrantaj aktoroj). Tiu korbo estis la lulilo por li kaj poste por iu fratineto. Sed bedaŭrinde tiu fratineto mortis kaj tio lasis lin malfeliĉe sola. En tiu soleco, li ludas, kun la kostumoj, kiuj nun troviĝas en la teatra korbo kaj li diras, ke, inter la diversaj kostumoj, li preferas la arlekanan ĉapon, kaj li skribas: "Jes, la arlekana ĉapo... Ĉu ne interese?... La ĉiama veo vivas en mi kaj tamen mi ridetas. Per tiu rido mi alkröĉiĝas al la Vivo... se dolorgrimaco deformas la trajtojn de miaj geamikoj, se larmojn mi vidas en iliaj okuloj, mi ekskuas la arlekanan ĉapon kaj mi ludas komedion por forgesigi la komunan kruĉportadon... mi estas ja la arlekeno de la Vivo".

Mi poste demandis min, kiujn spurojn de tiu sinteno, oni povas trovi en liaj romanoj, kiujn mi relegis tiucele. Kaj kion mi diros estas miaj rimarkoj pri la vivo de la romanaj roluloj, kiuj pli malpli filozofias pri la vivo, kaj la maniero elporti iun malagrablan ekziston provante plifeliĉigi la aliajn. Mia serĉo estas limigita al la romanoj, kiujn mi povis legi dum tiuj lastaj semajnoj, kaj kiuj estas laŭ ordo de publikado: Viktimoj (1925), Hura (1930), Printempo en la Aŭtuno (1931), Verdaj Donkiĥotoj (1933), La teatra korbo (1934) kaj Sur sanga tero (1935). Tiuj datoj de publikado ne estas gravaj pri la enhavo (ekzemple la antaŭparolo de "Printempo en la Aŭtuno" estas skribita en 1929). Plie, inter la publikado de la du romanoj pri Siberio pasis dek jaroj, sed la

roluloj estas la samaj, kaj mi preferas studi ilin samtempe. Nur post la fino de tiu revuo, eble oni povos cerbumi pri eventuala evoluo en la filozofio de Baghy.

La romanoj pri Siberio: "Viktimoj" kaj "Sur sanga tero" - En tiuj romanoj evidentas, ke la rolulo, kiu plej prezentas la aŭtoron estas Johano Bardy. Kion pensas, kaj kion faras tiu homo en la du romanoj? Iam lia amiko Droŝky diras: "vi estas pli pastro ol aktoro", en alia dialogo la prokuroro, kiu deziras moki nomas lin "apostoletro". Kiam Bardy parolas pri Esperanto, lia amiko respondas: "bone konante vin kaj vian entuziasmon, mi ĉiam timas, ke vi havos fatalan seniluziigon... vi estas tro sentema por esti feliĉa" kaj Bardy respondas: "Mi estas revulo, mi vivas en sonĝoj. Se iu forprenus de mi tiujn ĉi sonĝojn, kiuj fariĝis mia vivcelo, mi nepre mortus". Pli poste, kiam li scias kion faris lia edzino, li suferas, sed tamen, en la teatro, rolas la arlekeno de la Vivo. Je la fino de la unua romano, kiam Bardy scias ĉion pri la diversaj viktimoj (kaj speciale pri Katja), en la dialogo kun la prokuroro, li akuzas sin, li petas punon: "Puniĝon, pezan puniĝon li sopiris; li sopiris esti brute traktata de skurĝoj, por ne senti, ne dolori plu anime". Kaj li petas la deportadon en la "vagonaro de la morto". Fiza, parolante pri li, diras: "Bardy estas sankta homo". Sed en tiu vagonaro li helpas la aliajn al plua vivado, tiam la rolulo ne arlekenas, sed tamen laboras por la malfeliĉuloj. Kiam estas iom da trankvilo, Bardy povas klarigi sian kredon: "La sankta triunuo de la Vivo estas: volo, amo kaj kompreno. Mi estas pastro de mi mem kaj de tiuj, kiuj kredas la Vivon celhava. La celo de la Vivo estas pliperfektigo, kompleta scio pri la harmonia leĝaro de la Vivo. Foje la tuta vivo ŝajnis al mi io sencela, io stulta; poste, en

sendormaj noktoj tra suferoj, per oftaj eraroj mi ektrovīs la vojon al ĝusta konceptado de Dio kaj kreigis en mi mia propra religio. Mia dio estas la Kreanta Vivo, kiu kaŝas sin en la harmoniaj leĝoj de la naturo. Videbla kaj sentebla Diunujo, dividita en la materiala kaj spiritala tutaj de la kompleta vivo. Tiu ĉi Dio postulas konscian kunlaboron en la konstanta kreo. Hodiaŭ tio faras, ke la homoj senkonscie submetiĝas, ili ĉeniĝas al la ŝajno. Kompren-eble, ke la eternaj leĝoj kruele montras sian justecon." La virino al kiu li parolas respondas, ke tio estas nur konsolaĵoj, kaj Bardy respondas: "Sed la konscio ĉiam estas balzamo por la vunditaj animoj; sub ĝia protektado la vundo cikatriĝas, la sveninta vivovoĵo resaniĝas kaj en la nova sunbrilo la animo vidas ne sole la ombran flankon. Nin la homojn, nur la malvasta horizonto erarigas. La Kreanta Vivo estas eterna kaj nevenkebla." Kaj poste parolante pri sia rolo Bardy diras: "Mi estas revteksanta homo. Se la sonĝoj evitas min, mi sentas min mortinta. Ankaŭ tiaj homoj devas ekzisti. Ili fariĝas arlekenoj aŭ instruantoj de la homa komunumo. Mi estas arlekeno, kiu en la granda areno amuzas publikon. Kion mi faras? Post ĉiu vangofrapo mi pli obstiniĝas en mia fiksa ideo. La plimulto ridas kaj nomas min stulta. Sed ekzistas ankaŭ tiajn en la vicoj de la publiko, kiuj en mia obstina toleremo ekvidas la revteksanton kaj ili malfermas sian koron por miaj sonĝoj."

Hura - En tiu verko estas multaj roluloj, kiuj prezentas diversajn tezojn pri la Vivo. En la urbo Strumagen la homoj ne havas filozofion, ili nur baraktas por akiri monon, havi belan socian rangon k.t.p. Sed, opozicie, kelkaj homoj esprimas opinion pri la mondo. Jen tiuj opinioj: La vultur-homo: (Mizantropo, kiu provīs krei bestohomajn, ĉar li opinias, ke la homoj estas nur bestoj kaj ke ne povas ekzisti iu homa Homo). " Kio estas la vivo? Movo. Kial estas vivo? Por mueli la energion de la moviĝanta materio. Kio estas la animo? Aglomeraĵo de diversaj fortoj, muelantaj la materion. El

marĉo de cent kaj cent miljaroj ĝi devenas, nutras sin, farante senĉesan rondiron. Pro tio estas nekomprenebla, ne unueca, abomeninda kaj majeste stulta, la socio de la Vivo... La superforta ambicio de la Homo atingi la tronon de ĉiuj kreitaĵoj estas ridinda forto-streĉo el vidpunkto de la Vivo, kies gvidprincipo estas tro proza: movo por la movo eĉ sen celo."

Tamara (idealista rusino, kiu instruas Esperanton). Ŝi diras: "La Vivo estas bela kaj pura. La mono ne estas Vivo, la lukto por la mono ne estas Vivo, nur batalo por la Morto. En la marĉo de materialismo, pli objekte de la nura materialismo, trovitaj pensoj ne povas formi la bazon de la homa vivo. La Vivo estas pura kristaliĝo de la homaj sentoj, aspirantaj progreson...Diru al mi, tute sincere, ĉu ekzistas io pli bela, pli majesta ol renkonto al homo, etendanta sian koron al la frato?"

Iu"usonano" (fakte li estas Bagonano, sed tre Terta aktoro, kiu kapablas ŝteli). Li diras: "La vera ĉarlatano levas sin al la plej alta grado de sia profesio nur se li havas ankaŭ idealismon en la fundo de sia koro".

Lasta letero de Ivan (la komunisto komparas la idealojn de la tri rusaj gefratoj: (pri la skulptisto Juro) " ĉu la pesimistaj arto kaj filozofio, narkotantaj sin per optimismaj fiktivaĵoj, (pri lia fratino Tamara) aŭ la revteksanta homamo, drive baraktanta sur la furioza marĉomaro de la putranta socio, (kaj tiu lasta sinteno de la plej juna frato Ivan) aŭ la senindulga batalemo, ekstermanta la praarbaron de la tradicioj, ĝisradike pluganta la humon en kiu ĝi volas disĵeti la semojn de nova mondo?"

Tamara diras en la fino -" Ni vivas en neniiĝanta mondo, ni estas atestantoj de malaperanta epoko. La uragano de la Vivo furiozas, detruas. Sed malantaŭ la funebro-nuboj ridetas la firmamento kun siaj sunoj kaj stelaro, la nova suno: la nova etiko. (Kaj Tamara klarigas, ke):

dum la hundidoj estas nur hundidoj, la idoj de la homoj estas germano, franco, japano; oni edukas ilin kato-liko, judo, mahometano..." Jes la Maŝino kreas novan harmonion, novan moralon kaj liberigos la novan Homon el la katenoj ĉenantaj lin al la turbulo kaj la nova Homo ne kredos plu sed scios la Nevideblan"

Printempo en la Aŭtuno— La roluloj estas gimnaziano, junulino kaj du migrantaj artistoj. Jen kelkaj citaĵoj:

La gimnaziano:" Kion scias tiu ĉi Baranyos (matematika instruisto) pri la printempo kaj aŭtuno? Ankaŭ Newton vidis nur la gravitacian leĝon en la falanta pomo, kvankam ne la gravitacia leĝo gravas, sed la evoluo de la pomo el la odora floreto: la maturiĝo de la vivo".
Pri la ŝajno Balthazar, la divenisto, diras al la arlekeno Fridolin: "Prezentu al vi la gajecon, kiun vi vekus frapante la grandan tamburon kaj dirante al ili:" kredu la nekred-eblan, etendu la manojn al la neatingebla kaj kirasu vin per la plej bela ŝajno de via sonĝovojo, per la amo! Ho kiel oni ridegus! Kaj poste vi tiel daŭrigus: sorĉan forton, magian povon havas la amo. Ĝi igas nin blindaj kontraŭ danĝeroj, forgesigas la vanecon de la batalo... nu, tiam certe aplaŭdo rekompencus vian klopodon, ĉar oni pensus vin ŝercanta. Kaj se mi dirus: "Estu la fanatikuloj de la amo kaj tiam vi kredos komenci novan vivon post la morto, kaj estu amantoj de la amo, ĉar tiam vi banos vin en la fonto de la ĉiama juneco, gajnos la iluzion pri la eterna vivo. Nu, kaj post tiom da belaj sentencoj mi forigus mian maskon, montrus al ili mian milsulkan vizaĝon, blankajn harojn, ho kiel ili ridegus! Kaj poste por altigi la efikon vi montrus min kaj kun rikana mieno avertus ilin: estu singardaj, amu la amon pro la amo kaj ne pro la amata persono, ĉar tiam vi fariĝos la almozuloj kaj la pano el la almozula sako estas saturita de larmoj...nu tiam, certe oni konsiderus vin la plej granda spritulo de la mondo...Sed forviŝu la ŝminkon de la vizaĝo, vestu vin per frako, dekoru vin per ordenrubandetoj

kaj kun dignoplena pozo kun sciencula sinblovo diru al ili, ke laŭ viaj lastaj esploroj vi konstatis la gravedecon de la Tero, baldaŭ akuŝonta novan Lunon, mi asertas, ke ili kredos vin, kaj por la ekspluato de la fantazikreita luno, vi povos fondi akcian societon kun kolosa kapitalo...Grava estas sole la ŝajno!
Filozofio de Balthazar: "Ili (la gejunuloj) ne scias, ke sur duobla vojo pilgrimas la animo kaj nur fabelas la Vivo kaj nur fabelas la Sonĝo. La vojon de la Vivo onbrumas nigraj nuboj; tiun de la Sonĝo orumas la rideto de la ĉielbluo. La ornamo de la unua estas teraj sarkindaĵoj; tiu de la dua estas pompantaj sopirfloroj..kaj sur la duobla vojo trenas pene sin antaŭen, ĉiam antaŭen la Homo: unu korpo kaj unu animo. Li ŝirkolektas la sarkindaĵojn, mensogas al ili koloron, odoron, por ke li povu doni sencon al la longa vojo...Kaj kio estas la celo? La fino. Por tio estas la baraktanta sinpelado, la mistifikaj koloraj mensogaĵoj, la grasigitaj bagateloj, la troa ambicio de la naneco, por ke ili povu eviti la finon? Ĉu fino aŭ nova komenco? Li ne scias...Kaj la erarema malkuraĝa Homo pro timo mensogas al si Eternan Vivon...Kompatingulo, li forgesas, ke la vojo de la Vivo kaj Sonĝo estas senfina, ĉar ne estas Tempo, nek Loko, ekzistas nur ŝajno. La ŝajno estas la leĝo, kiun li konsideras dia revelacio kaj lia dio estas tiu suvereno, kiu estras la ŝajnon. Por indulgo li petegas al la ŝajno kaj la ŝajnoleĝo frakasas lin egale, ĉu li pilgrimadas sur la ŝtonplena vojo de la Vivo aŭ sur la sopirflora paŝejo de la Sonĝo. Kio estas do? La perioda movo de la ŝajnoj kaj tio ĉi donas la iluzion pri Tempo, Loko, Vivo, Sonĝo kaj Morto." Tiam Fridolin proponas, ke li grimacos al la junuloj por ĝojigi ilin. Tiam Balthazar aldonas: "Tiel, tiel mia kara arlekeno! Vi estas la saĝa malsaĝulo kaj mi la mal-saĝa saĝulo. Ni kompensas unu la alian. Vi instruos la homojn, ke ili mensogu al si plezurojn, dolorojn, venkon kaj gloron kaj nomu la suferon bela, la laboron nobla, la ŝajnon reala...Sole tiamaniere daŭros la iluzio: la krono de la kreitaĵoj estas la homo destinita je eterna vivo.

PRI REĜO ARTURO KAJ ALIAJ

(FINO)

Ambaŭ mondoj rekuniĝas sur ĉiuj terenoj: fizika, emocia kaj spirita. Sur tiu lasta nivelo la Gralo proponas alian amoformon. Ĝi do konsistigas la plej profundan enigmon de la artura tradicio. Eternaj estas la servofarado kaj serĉado. Samkiel la membroj de ununura familio, kunigataj estas la partoprenantoj en ununura frataro. La servofarado estas la pordo, kiu ekrilatigas la du mondojn, la ponto, kiu kondukas al Dio.

En tempoj tro praaj por esti difinitaj, ideo konkretiĝis sub formo de "sankta ujo", en kiu kuŝas la tuta saĝo, scio kaj kompren-kapablo. La Helenoj ĝin difinis, kiel la vazon, en kiu la diaĵoj miksas la materion de la kreitaro. Simila bildo troveblas en Hindujo, Japanujo, ĉe la Slavoj. La Keltoj parolas pri "kaldrono", propraĵo de la gediaĵoj Keridwen kaj Bran.

Ĉirkaŭ 1280 Chrétien de Troyes, jam fama pro siaj poemoj pri diversaj epizodoj de la artura tradicio, ekverkas sian lastan romanon: "Perceval, aŭ la rakonto pri la Gralo", sed li mortas ne finverkinte ĝin. La samtempuloj tiel entuziasmiĝas, ke kvar aŭtoroj reeklaboras. Aliflanke Robert de Boron estas la aŭtoro de Trilogio, en kiu li identigas la Gralon kun la kaliko de la Sankta Manĝo kaj li definitive kunligas la simbolon de "sankta ujo" kun la kristana tradicio. Perceval, la kavaliro, kiu mutis, kiam li devintus fari la ritan demandon, aperas en ĉiuj romanversioj, kiel la ĉampiono de la Gralo. Ĝia gardisto apartenas al la familio de Jozefo de Animateo, la riĉa judo, kiu fordonis sian propran sepulkron, por ke Kristo estu tie enterigita. Post la Releviĝo li ricevis de la kristaj manoj mem la Gralon kaj saĝon en ĝi entenatan.

Dezerta kaj malfekunda estas la reĝolando, kie la Gralo estas kaŝita kaj tie nekredeblajn aventurojn frontos la partoprenantoj en la serĉado. kaj venos fino nur kiam la Kavaliro de la Gralo faros la ritan demandon. Tiam la reĝo resaniĝos, la grundo refekundiĝos kaj nedirebla influo tiros la mondon al profundaj ŝanĝiĝoj.

Trafi la sanktan pokalon, dividi la sperton de tiuj, kiuj ricevis ĝiajn finajn sekretojn, tio estas liberigi ian fortan, amon, energion cele al pura servofarado.

Tutcerte la kuniĝo de la Gralo kaj Eŭkaristio estis la plej unuaranga afero: la Gralo simbolas la grandan sinoferon de Kristo. Tiu senpera komuniĝo kun la dia dimensio apartigas la Gralon disde la ceteraj sanktaj ujoj. La Gralo, serĉ-objekto por la Rondatablaj Kavaliroj, estas ankaŭ universala simbolo, kiu kondukas al la serĉado pri la memo, pri iu absoluto, kia ajn estu ĝia nomo.

Inter la dekdua jarcento kaj la frua duono de la dektria la grala bildo preciziĝas. Robert de Boron raportas pri la veturigo de la pokalo ĝis Britujo. Kial la dektria jarcento estis taŭga epoko por la prilaborado de tiu mito? Ĉar la kristanoj tiam ĝuis relativan liberecon surkampe de doktrino. La starigo de Inkvizicio datiĝas proksimume de 1230 kaj pasos 50 jaroj antaŭ ol la Eklezio aprobas turmentadon.

Kaj anonima monaĥo, eble sub impulso de Bernard de Clairvaux, enkondukante la rolulon Galaad, tiras la legendon al nova vojo: Galaad estas la perfekta kavaliro, filo de Lanceloto kaj de la princino de la Gralo, la heroo, kies destino estas jene difinita: retrafi la kastelon de la vundita reĝo, lin resanigi, la grundon refekundigi. Por koherigi la diversajn rakontojn, tiu religiulo elpensas homfiguron tre similan al tiu de Kristo: homon kapablan "elaĉeti" la antikvajn legendojn ilin forigante el pagana deveno.

Tian heroon bone difinas -verso de la angla poeto Tennyson: "Mia forto egalvaloras tiun de dek viroj, ĉar puras mia koro."

Se Arturo, la vundita kavaliro, personigas la mistikan reĝolandon en la geografiaj limoj de Britujo enfermitan, se Guenièvre estas unu el la facetoj de la Granda Diino, fianĉino de la floroj, amvundita reĝino de la printempo, Galaad devus esti la filo de tiu paro. Sed... Arturo generis bastardon kaj Lanceloto amoris kun Guenièvre. Galaad, la elaĉetonto, atingos la Gralon, sed

mankos la fina transfiguriĝo, ĉar la paradizo ne estos surtere restarigita. Nur per unu rigardo Galaad ekvidos la enhavon de la sankta pokalo kaj li mortos sub dezirekstazo, unuiĝonte kun la Absoluto.

Kaj se siavice la homoj konsentos partopreni en la resaniga kaj elaĉeta agado de la Gralo, al ili estos reciprokata parto de ĝia beno.

Simone BONIOL



Lancelot kaj Guenièvre kune trinkas la amtrinkaĵon.

FA MA MOVADA PIONIRO

B. Golden

Tiu ĉi kvizo konsistas el 20 inform-spuroj pri grava persono en la historio de Esperanto. La faktoj estas aranĝitaj laŭ kronologia vicordo kaj prezentas koncizan biografion de la koncernulo. Provu diveni, pri kiu temas. Se vi sukcesas antaŭ ol vi atingas la kvinan informon, vi meritas eminentan noton pro via profunda scio de la historio de la movado. Se vi trafe nomas lin inter la 5-a kaj la 10-a eroj de lia biografio, vi rajtas rigardi vin kiel tre bone informitan esperantiston. Eĉ se vi bezonas 15 helpilojn, vi estas inda je laŭdo. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias, kiu li estas post la 20-a informo ne estu malgajaj. Ili konsolu sin sciante, ke ili lernis plurajn sciindaĵojn pri la frua historio de la Esperanto-movado.

1- Li naskiĝis en la sama jaro, en kiu estis eldonita la "Unua Libro" de d-ro L.L. Zamenhof. Lia patro venis de vilaĝo proksime al la urbo, kie okazis la 9-a, 31-a kaj 32-a Universalaj Kongresoj.

2- Kiel idealisto kun granda praktika sento, li faris signifoplenajn kontribuojn sur la tereno de la Esperanta beletro kaj ĵurnalistiko, kaj ankaŭ kiel aktivulo, organizante kaj gvidante gravan internacian Esperanto-organizaĵon.

3- Li lernis Esperanton en 1903 dum li ankoraŭ estis gimnaziano. En la sama lernejo estis alia junulo, kiu sendepende lernis la internacian lingvon. La du komencis praktiki la lingvon kune kaj baldaŭ fondis klubon kaj monatan revuon, "Juna Esperantisto", kiun ili kunredaktis sur benko en sia lerneja kursĉambro.

4- La amiko priskribis lin jene:

"alta, malgrasa, malriĉa kun mirindaj okuloj kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton." Oni diras, ke li estis modelo por sia patro, kiu estis pentristo.

5- La du amikoj helpis prepari la 2-an Universalan Kongreson, kiu okazis en 1906 en Ĝenevo. Ambaŭ servis kiel sekretarioj de la Organiza Komitato.

6- Post la 2-a Kongreso la du junaj esperantistoj iris malsamajn vojojn. Edmond Privat abiturientiĝis en la somero de 1907 kaj post poresperanta propaganda vojaĝo en Eŭropo kaj Ameriko, revenis al Svislando en 1909 por komenci siajn universitatajn studojn. Dume, lia samlerneĵano, ĉesiginte pluan lernejan edukadon, komencis dediĉi sian vivon ekskluzive al la Esperanto-movado.

7- Li daŭre pensis pri manieroj fari Esperanton praktike uzebla. Pro tio interesis lin la proponoj faritaj dum la 2-a Kongreso rilate Esperanto-konsulojn kaj publikajn oficejojn por helpi esperantistojn, kiuj vojaĝas aŭ havas informetojn. Tiel ekĝermis la ideo de la delegita reto, kiun li poste helpis realigi.

8- Post la 2-a Universala Kongreso, René de Saussure, privata docento ĉe la Ĝeneva Universitato, interesiĝis pri Esperanto. Li fondis oficejon, unue propagandan, poste sciencan (la Internacia Scienca Oficejo esperantista), en Ĝenevo. La 19-jara junulo laboris tie kiel sekretario.

9- Li estis tre verkema esperantisto. Liaj korespondaĵoj plenigis 12 volumojn. Li kontribuis artikolojn kaj tradukaĵojn al "Tra la Mondo" kaj "La Revuo". Li tradukis el la franca "Paŭlo kaj Virginio" de Bernardin de Saint-Pierre (1905) kaj el la germana "Sabla Homo" de E.T.A. Hoffmann (1907).

10- Li transprenis redaktadon de la revuo "Esperanto", fondita en 1905 de Paul Berthelot, kaj poste

aĉetis ĝin kaj fariĝis ĝia posedanto. La unua numero, kiun li eldonis, aperis la 12-an de februaro 1907. Li signis siajn tradukojn kaj artikolojn per la literoj A.R.

11- Kiam eksplodis la Ido-krizo en novembro 1907, li eldonis ĉirklulon en kiu li esprimis sian opinion, ke "neniu havas rajton enkonduki reformon per dekreto" kaj ke "estas dezirinda la starigo de internacia organizaĵo, kiu puŝos Esperanton rekte en la vojon de la praktikaj aplikaĵoj..."

12- Li celis fondi organizaĵon, kiu ne diskutos lingvajn problemojn, nek forigos la Lingvan Komitaton nek la Kongresojn nek la Centran Oficejon en Parizo, sed uzos la lingvon praktike por unuigi ĉiujn uzantojn.

13- Por atingi tujan uzeblecon de Esperanto fare de vivanta esperantista popolo, li fondis Universalan Esperanto-Asociacion (UEA) la 28-an de aprilo 1908. Dum sia laboro ĉe UEA li vivtenis sin per malgrandaj pagoj ricevitaj de sia patro. Lia sanstato komencis malboniĝi pro pulmo-malsano.

14- "Esperanto" daŭre aperis dum la Unua Mondmilito kun la escepto de ses-monata provizora ĉeso. Li, kun sia sekretario, Hans Jakob, organizis helpservon, kiu peris la transsendon de korespondaĵoj al homoj disigitaj pro la milito.

15- Li daŭrigis sian verkadon dum tiu periodo. En 1913 aperis lia germanlingva verko "Der Esperantismus" kaj inter 1915-1917 li verkis traktatojn pri pacismo. Lia malsano fariĝis pli grava dum la militjaroj.

16- En 1918, post longa fianĉiĝo, li edziĝis kaj luprenis loĝejon en la montara kuraĉloko Leysin en Svislando.

17- En la sama jaro mortis lia patro Ferdinand, fama svisa pentristo. Li postlasis al sia filo sian tutan havaĵon.

18- La filo ne longe profitis tiun financon helpon. Li mortis pro tuberkulozo en 1920. Kun la celo garantii la estontecon de UEA, li testamentis monon por la Asocio.

19- Okaze de la sesdeka jubileo de UEA, en 1968, oni komencis restarigi la kapitalon de la fondinto per kreo de simila fonduso, kiu omaĝe portas lian nomon.

20- Lia nomo estis donita ankaŭ al unu el la plej valoraj Esperanto-bibliotekoj en la mondo, kiu troviĝas en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

RESPONDO

Hector Hodler (1887.10.01-1920.03.31) estis la dua redaktoro de "Esperanto" kaj la fondinto de "Universal Esperanto-Asocio". Li havis la rentumo de Instituto Hodler subtenas valorajn kulturaĵojn kaj organizaĵojn en Esperantujo. Biblioteko "Hector Hodler" estas neelĉerpebla trezoro de historia, literatura kaj lingvaj donitaĵoj pri Esperanto.



LA MUMIO DE LA REĜO TABINIT

Tabinit ekiris antaŭen. Sed baldaŭ atingis pordon, kiu estis fermita. Li do klakis per la manoj unu, du fojojn, sed li rimarkis kun miro, ke li perdis la sentkapablecon en la manplatoj kaj ke ĉe la dua klako pecetiĝis kaj defalis du liaj fingroj.. Li levis ilin kaj iris antaŭen. Kontraŭ si li ree ekvidis pordon. Sed ankaŭ ĉi tiu pordo estis fermita. Li ne klakis plu la manojn kaj sin turnis al la flankaj salonoj.

Ĉe la eniro li ekvidis luksan sarkofagon el blanka ŝtono, sur kies flankoj estis ĉizitaj figuroj de Persoj kaj Makedonianoj. La figuroj koloritaj per blua kaj hele ruĝa farbo, prezentis batalon. Tabinit neniel povis rememori, kia batalo tio povus esti, kvankam li ĉiujn povis iam nomi unu post la alia kaj diri, kiu gajnis, kiom da soldatoj falis, kiom oni malliberigis, ĉar ĉio ĉi forte lin interesis. Li ekrigardis en la sarkofagon; ĝi estis malplena, kiel la aliaj. Dum mallonga tempo li vidis tiom da eksterordinaraj aferoj, ke tio ne mirigis lin plu, sed kontraŭe ŝajnis al li natura. Li do ekiris al la sekvantaj salonoj.

Li rimarkis tiom da objektoj, kies uzon li tute ne povis diveni. Krom tio sur ĉiu paŝo li renkontis skulptartajn strangaĵojn, kiuj ofendis lian fenician artistan senton. Li renkontis kapitulojn kun homaj vizaĝoj ĉe la anguloj. La lipharoj kaj barboj estis vibraj folioj. Tabinit forte indigniĝis. Poste li renkontis tutan kolekton de haŭtoj de homaj vizaĝoj, formitaj el argilo kun abomenaj grimacoj. Tabinit preterpasante deturnis la okulojn.

Pli libere li ekspiris en salono, kie li renkontis multenombrajn pecojn de Troja oro. Multe da ĝi li iam posedis, kvankam ĝi estis iom eluzita kaj oni akceptis ĝin nur je la pezo. Lia avideco estis forte ekscitita, ĉar li trovis

veran trezorejon de plej diversaj juveloj. Li meditis, ĉu li ne povus kunpreni ilin. Sed kiam li ekrigardis sin mem li rimarkis, ke li ne havas vestojn kaj ne povus kaŝi la juvelojn. Sur breto staris skatolo, lukse kovrita per perlamoto. Li decidis meti la juvelojn en ĉi tiun skatolon. En la momento, kiam li etendis la manon al la skatolo, li rimarkis bronzan statueton de Apis. Li neniam honoris lin per sia adoro, sed li ŝatis lian influon. La bronza bovo rigardis rekte al li. Tabinit foriris de lia rigardo, kaj tio estis tiom pli facila, ke la tabloj kun la juveloj staris eĉ tie, kien la rigardo de Apis ne povis atingi. Dume li rimarkis hazarde sur muro pendigitajn plej diversajn armilojn. Ravis lin kelkaj glavoj, arkoj, ĵetponardo kaj precipe hakiloj. Li jam estis etendonta al ili la manon, kiam li eksentis sur si la rubenan okulon de la roma Jupitero. Ĉar li havis grandan respekton al ĉiuj fremdaj dioj, li do ankaŭ ĉi tiun fojon noble ekregis sian pasion kaj ekiris antaŭen.

Tuj ĉe la turniĝo li rimarkis pordon. Ankaŭ ĉi tiu estis fermita. Li konvinkiĝis nun, ke li estas en iu stranga palaco aŭ trezorejo, zorge fermita de ĉiuj flankoj, en kies salonoj oni kolektis ne sole plej diversajn objektojn sed ankaŭ sarkofagojn kaj mortintojn, metitajn en ilin, ofte egalajn al dioj.

Li demandis sian senmortan animon, kiu povis tion fari kaj kun kia celo? Malfermi tiom da sanktaj tomboj. Rabi tiom da nekropoloj? Malhonori tiom da reĝaj mumioj? Kiu estas tiel potenca kaj tiel sendia?

Ne sufiĉis al la nekonata "li", ke li elprenis reĝojn el la sarkofagoj kaj rabis, ke li malfermis la nekropolojn de ĉiuj popoloj kaj prenis el ili ĉion, kio estis sigelita en ili per plej teruraj ĵuroj...diojn mem li rabis kaj starigis ĉi tie! La tero kaj ĉielo ne sukcesis kontraŭstari al ĉi tiu estro, monstre potenca, sentima kaj malŝatanta la estintecon! Ĉu Aatmes, la filo de Peneftah,

kruela najbaro, kiu ĉiam estis preta levi sian manon kontraŭ ĉio kaj nenion respektis, kiel sanktan kaj netuŝeblan, fariĝis tiel potenca? Ne, ne! Aatmes estus bruliginta lian mumion, ne zorgante pri la maljustaĵo, kaj lia senmorta animo neniam plu povus retrovi sian mumion.: Tabinit mortus por eterne kaj lia animo fariĝus animo vaganta... Do, ne Aatmes. Kiu do? Posteuloj de la egiptaj faraonoj? Ne! Ili povis atingi ĝis Fenicio, plej malproksimen ĝis Asirio! Sed ĉi tie estis kolektitaj riĉaĵoj, de ĉiuj popoloj, de ĉiuj reĝoj! Kaj krom tio, kie estas la korpo de lia amata edzino? Kie estas ŝia mumio? Eble ĝi estas bruligita? Kaj malgraŭ ĉiuj duboj li ree ekpensis pri Aatmes, ĉar li volis delogi la edzinon de Tabinit kaj ŝi ne cedis al lia persekuto. Tiam li diris al ŝi: terure mi venĝos al vi kaj via Tabinit! Aatmes estis klera kaj konis la hieroglifojn. Do se li legis la surskribon? Se la birdoj ĉion kantis al li kaj la serpentoj siblis ĉion, kiel kruela estos via venĝo! Jes, sendube tion faris Aatmes, en ligo kun la najbaroj. Li ĉiam havis grandan talenton por ligoj; li ĉiam ripetis, ke li kreos armitan pacon en la tuta Azio!

Aatmes certe bruligis la mumion de lia edzino kaj kun lia mumio li faros la samon dum iu nova soleno. Tabinit ekŝanceliĝis. En la sama momento la malklara luno en la fenestroj fariĝis pli kaj pli hela, kaj ekstere ĉirpis la matenaj birdoj. Tabinit sin turnis, por iri al la salono, kie staris lia travidebla skatolo. Li ekaŭdis bruon ĉe la kontraŭa pordo kaj mallevadon de la rigliloj. Timo ekregis lin. Sin apogante je la renkontataj objektoj li paŝis kun granda peno antaŭen kaj antaŭen. Blindiganta helo de ĉiuj flankoj superverŝis la konstruaĵon. La pensoj de Tabinit fariĝis malklaraj. Li sentis, ke la senmorta animo forlasos post malgranda momento lian korpon. Li batalas kontraŭ si mem. Li aŭdas jam la grincon de la ŝlosiloj kaj paŝojn.

Ho, posteulo de Peneftah! Se tio estas vi, se nun vi trenos la mumion de Tabinit al lignaro, se vi intencas fari al li tiun plej teruran maljustaĵon, ĵetu sur vin Beel ĉiujn malsanojn, defalu de viaj ostoj la karno en vivantaj pecoj, mordu ĉiuj doloroj, kvazaŭ malsataj vulturoj, vian trunkon, vi, ŝtelisto de nekropoloj, rabisto de kadavroj, pirato de reĝoj kaj dioj!

En la sama momento Tabinit faletis je la travidebla skatolo. Puŝata de teruro, li sin kuŝigis kaj surmetis la kovrilon. Kaj ree la senmorta animo forlasis lian mumion, fermiĝis liaj okuloj, kaj la buŝo fariĝis malgranda, kiel monero ronda, pagata por la mortintoj. La cedraj brakoj kaj lumboj, sekigintaj kiel splitoj, etendiĝis kaj Tabinit ekdormis la dormon de la muzeo.

Super lin klinis kelke da homoj, kaj iu el ili, tuŝante per la fingro la vitran kovrilon diris kolere: "Kia malzorga surgluado! Post unu monato penetros la vermoj kaj la mumio valoranta kelke da miloj da frankoj, disfalos en polvon."

El la pola lingvo tradukis Dro Kabe

KARAJ LEGANTOJ

Pro la altiĝo de la sendkosto kaj aliaj elspezoj ni estas devigataj altigi la prezon de la abono.

Jam de pli ol kvin jaroj tiu prezo ne ŝanĝiĝis. Por la jaro 1994 bonvolu noti, ke ĝi altiĝos al

80 ff.

Por Ameriko kaj Azio la aerpoŝta tarifo estos: **120 ff**

Kompreneble vi daŭre rajtas sendi pli grandan sumon por helpi nin. Dankon.

POR VIA DISTRO

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1	Ŝ	O	V	E	L	A	D	Ĉ
2	U	V	O			U	R	A
3	F	U	M	A	T	E	N	C
4	A	L		E	R	O		
5	R	O	B	R	O		E	I
6	i		E		j	U	N	I
7	S	I	L	E	N	T	O	M
8	T	j	U			A	R	T
9	O	K	L	A	H	O	M	C

NOMBRA ENIGMO

Al ĉiu nombro respondas unu litero. La solvo konsistas el 60 literoj.

La ŝlosilvortoj estas:

9, 6, 26, 39, 2, 13, 14, 12, 27, 4: esperantista insigno.

51, 41, 42, 10, 59, 60: soldata virto.

16, 53, 11, 48, 49, 50, 39, 21, 53, 8: okcidenteŭropa ĉefurbo.

37, 38, 21, 29, 30, 5, 35, 36: senpieda surtera besto.

45, 46, 47, 33, 3, 56, 55, 52: nazkorna bestego.

32, 4, 34, 17, 25, 1, 15, 23, 19, 8: granda muzikilo.

7, 28, 20, 2, 57, 58, 40, 18: itala violonvirtuozo.

26, 15, 24, 44, 22, 18: denove fari la samon.

43, 46, 54, 31, 60: altpreza spicaĵo.

Laŭorde; apudmetante ĉiujn literojn de numero 1 ĝis numero 60, vi trovos vortojn de profesoro Albert Einstein.

LA VIVO

EN GRESILLON

Antaŭ kelkaj jaroj vizitis la kastelon Gresillon samideano, kiu antaŭ sia emeritiĝo zorgis pri la arbaro de Fontainebleau. Dum sia restado, Paul Vayssieres ofte, longe promenadis tra la parko kaj la arbaro kaj lia specialisto okulo rimarkis la multajn arbo-specojn. Li lasis notojn, kiujn li faris pri pluraj dekoj da diversaj specoj. De tiu tempo malaperis kelkaj arboj pro malsano, maljuneco aŭ ventego. Nur unu speco malaperis. Ni parolos pri ĝi fine de tiu ĉi artikolo.

La grundo sur la bieno konsistas ĉefe el tavolo de sablo kun oftaj argilecaj lokoj, kiuj apartigas la akvotavolojn. Sed la fakto, ke kreskas kaŝtanoj, maronaroj kaj pedunklaj kverkoj atestas la subgrundan riĉecon, ofte sub tavolo de podzolo, grizeta cindreca tero.

Ambaŭflanke de la vojeto, kiu, tra la parko, kondukas de la ĉefa vojo al la kastelo kreskas svisaj popoloj, pli ol ducent el ili en la parko. Oni rekonas iliajn triangulajn foliojn. En la arbaro mem, laŭlonge de la padoj, staras avelarboj, kies falintaj folioj plibonigas la grundon. Videblas ankaŭ blanktrunkaj betuloj. En aliaj lokoj kreskas ankaŭ karpenoj, tilioj, abioj, diversspecaj pinoj kaj belegaj cedroj. La promenanto povas admiri ankaŭ merizarbojn, akaciojn kaj robiniojn. Apud la lageto ombras la akvojn majestaj platanoj, belaj salikoj kaj kelkaj alnoj.

Sub aŭ apud tiuj arboj kreskas kratagoj, kornusoj, diversaj filikoj, el kiuj la "aglofiliko", kies tigo montras aglon dukapan, kiam oni tranĉas ĝin.

Necesas promeni tutan tagon

tra la parko por vidi ĉiujn diversajn arbojn kaj arbustojn. La promenanto haltos antaŭ kelkaj el ilmi pli longe pro ilia aspekto, ilia aĝo aŭ malofteco.

Meze de herbejo kreskas juna purpura fago, kiu reliefigas kontraŭ la verda muro de la arbar-fronto. En iu angulo modeste sin kaŝas, meze de aliaj arboj "alizulo torminala", kiu donas la plej multe kostan meblolignon. Aliloke neniu preterpasas la kverkojn ĉefe tiuj, kiu staras ĉe la rando de la arbaro kaj verŝajne estas kvincentjara.

Kelkaj arboj venas el eksterlando, kiel ailanto, pavlonio kaj ginko. Tiuj ĉi lasta meritas specialan atenton ne nur pro siaj apartaj ecoj, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi estis donacita de iu fidela, kara, germana amikino. Ĝi ne multe kreskis kaj ne tre longe postvivis la donac-intinon.

Ni tuj diru, ke la ginko triloba estas la plej maljuna arbo en la mondo. Ĝi verŝajne ekzistis jam antaŭ 50 milionoj da jaroj. Tion atestas trovitaj fosilioj. La tiamaj unuaj kreskintaj arbaroj konsistis el gigantaj filikoj, ekvizetoj, likopodoj kaj ginkoj. Malaperis la dinosaŭroj; pluvivis la ginko. Ĝi eĉ fariĝis protektanto de buddaj temploj. Oni diras, ke, dum la tertremo, kiu detruis grandan parton de Tokio, en 1923, iu templo ne estis detruita ĉar ĝi estis ĉirkaŭita de ginkoj. Kiamaniere tiu arbo sukcesis forpeli la malfavorajn spiritojn? Eble dank'al siaj fruktoj, kiuj, kiam falintaj, putras sur la tero kaj odoras ege malagrabla. Tiuj fruktoj estas la inaj organoj de la ginko; la fekundado, renkonto hazarda kun masklaj spermatozooj, povas okazi sur la arbo aŭ surtere. La juna ginko disvolviĝas same kiel kokido en ovo.

Tiu arbo estas konata en Francio sub la nomo "kvardekeskuda arbo"; ĉar, fine de la 18-a jarcento, iu franca amatora botanikisto renkontis

en Londono, florkulturiston, kiu posedis kvin plantojn de ginko. La kulturisto petis 200 eskudojn por la tuto; do, ĉiu juna ginko kostis 40 eskudojn. Tiuj 5 arboj naskis multajn idojn kaj nun oni povas renkonti " kvardekeskudajn arbojn" en diversaj lokoj en Parizo, ekzemple ĉe Champs Elysées; ankaŭ en Montpellier kaj Liono. Sed la plej belaj, tuta avenuo, staras antaŭ la stacidomo de Saint-Sulpice-de Laurière, apud Limoges.

Unuavide la ginko similas iun ajn arbon, krom la fakto, ke ĝi

povas atingi altecon 30-metr. Sed ĝiaj folioj similas mi da bruetaĵoj ventumiloj, helven en la printempo kaj orkolo en la aŭtuno. Unue la ginko aparte al la klaso de koniferoj; sed ĝi pluraspekte diferencas de la klaso, nun oni klasifikis en la ginko-klasoj, sola atesta de arkaikaj strukturoj.

Jam de jarcentoj la Orienta malkovris la kurackapablojn la ginko. Sed nur de kelkaj jaroj la okcidenta farmacia industrio interesiĝas pri la ecoj de milionjara arbo.

LIBRO - SERVO

Alproksimiĝas la jarfino; pensu pri donacoj al viaj korespondantoj. La Libro-servo pliriĉiĝis per kelkaj novaĵoj:

de A. PETTYN: "Ĉu vi parolas esperante?" La libro kostas 50 f.f. kaj la du akompanaj kasedoj 120 ff.

"Esperanto en epizodoj" (55 ff.)

Por havi simplan sed bonan rigardon al la gramatiko helpas vin la "Gramatika ekzercaro" de J.P. Bielinski (10 ff.)

Por la studemuloj ĵus reeldoniĝis:

"Historio de la mondlingvo" de Drezen, kiu tre komplete pritraktas la genezon de la ideo pri mondlingvo (168 ff.)

"Originala Verkaro" de L.L. Zamenhof (120 ff.)

Por via distro, vi povas elekti inter:

"La dormanta grafino" de Ŝirjaev (105 ff.)

"Kaverno apud la maro" de Bertram Potts (52 ff.)

"La nokto de la ezoko", de Elgo (80 ff.)

"Poemo de Utnoa" de Abel Montagut (150 ff.)

Ankaŭ kelkaj brokantaĵoj disponeblas. Petu la katalogon de:

S-ino Vincent, 26bis, rue de Milngavie, F-49150 BAUGE, tel: 41 89 29 47.

Fonduso Infan-renkonto

La Printempa Internacia Infan-renkonto tre bone sukcesis: sesdek geknaboj ĉeestis. La laboro rarita, per kaj pri esperanto, estis granda kaj efika. Tiun sukceson ni ŝuldas al vi, kiuj malavare finance helpis. Denove ni dankas vin. Saman, eĉ pli grandan sukceson ni povos atingi en 1994 se vi same, eĉ pli, helpas nin. Ni povas akcepti la jam anoncintajn esperanto-klasojn el nepagipovaj landoj nur se ni kapablas repagi parton el la vojaĝkostoj kaj senkoste gastigi ilin. Sendu vian kontribuon, grandan aŭ ne, al: Maison Culturelle Esperantiste, poŝtkonto: Nantes 1485 39 P. Dankon.


GRAMATIKO PER BONHUMORO

La vorto « po » antaŭ iu esprimi de mezuro signifas, ke tiu mezuro rilatas, ne al ĉiuj personoj aŭ objektoj kune, sed al ĉiu aparte ; ekzemple ili ricevis po kvin pomoj : ne ĉiuj kune ricevis kvin, sed ĉiu el ili aparte ricevis kvin pomojn ; la drapo kostas po du spesmiloj por metro : ĉiu metro (ne la tuta drapo) kostas du spesmilojn ; ili vendas pogrande : ĉiu aparta porcio, kiun ili vendas, estas granda (t.e. ili vendas nur grandajn porciojn). Oni ne povas diri « je 80 centimoj po funto » aŭ « 30 mejloj po horo » sed oni devas diri « po 80 centimoj por ĉiu funto », « po 30 mejloj en horo ».


(L.L. Zamenhof — « Lingvaj Respondoj »)



— Mi bezonas tri ŝparmonujojn ; mi metos mian monon po mil frankoj en ĉiun.



— Oni ne diris al ni, ke ni loĝos po 2 aŭ 3 en ĉiu ĉambro !



— Mi finos tiun pentraĵon, laborinte dum 10 tagoj po unu horo, ĉiu tage.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).


Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboã.

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni ia internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34